ANTAŬEN
suplemento de Informilo
2/33 junio 2025

❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖

**Enhavo: La kaŝita potencialo de vesporegnoj, Brazilanoj festas**

❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖

# La kaŝita potencialo de vesporegnoj

Ni pensas, ke vespoj estas la plej ĝenaj kaj senutilaj insektoj. Homoj malbenas kaj timas vespojn. Kia estas la vero (fakto) koncerne ilian utilecon por la biosfero?

Parte ili havas la negativan famon merite, ĉar kvankam ili nin ĝenas nur somere, ili estas kapablaj nin piki kaj por multaj homoj tio povos kaŭzi gravajn sanproblemojn. Aliflanke oni forgesas la multe pli pozitivan rolon de vespoj en la ekosistemo.

Homo povus lerni multon de ili kaj estas eblo, ke ili inspiris niajn delongajn praulojn, kiel produkti paperon el ligno. Ili laboras sen ripozo en komuna laboro, kiu estas kondiĉo por plua transvivado. Ili ne estas malpli laboremaj ol abeloj. Ili maĉas pecetojn de branĉetoj, pulvorigas ilin kaj de tiu papersimila substanco ili konstruas neston.

En la ĉeĥa naturo funkcias vespoj kiel eminentaj reguligantoj de aliaj damaĝuloj, ĉefe larvoj kaj raŭpoj de diversaj papilioj, ĉefe noktaj, kiuj povas ekzemple tute detrui fruktarbojn kaj rikolton de legomoj en ĝardeno aŭ la arbaran vegetajaron en iuj okazoj komplete neniigi. Vespojn pro tio kondamnas nek arbaristoj nek hakistoj. En la arbaro trafita de ŝeloskaraboj vespoj ludas

eminentan rolon. Kiam la de hakita infektita arbo estas senŝeligita, larvoj de ŝeloskaraboj estas por vespoj la serĉata fonto de proteino.

Populacio de vespoj renoviĝas ĉiujare denove, kaj dependas de vetero kaj de aliaj faktoroj, kiel ili fartos kaj kiom multaj ili estos. Neniu kolonio de vespoj transvivas pli ol jaron. Pasintjare pro la milda vintro kaj tre baldaŭa kaj varma printempo, vespoj komencis establi nestojn tri aŭ kvar semajnojn pli frue ol kutime. Pro tio iliaj kolonioj estas pli multnombraj kaj estas individuaj vespoj, laboristinoj, do multe da ili estas en la nestoj.

La reĝino ĉiam mortas aŭtune, elkoviĝas novaj reĝinoj, novaj virseksuloj, pariĝas kaj la sekvan vintron transvivas nur novaj reĝinoj. Ĉiuj aliaj vespoj pereas. Printempe reĝinoj establas propajn nestojn, kien ili metas ovetojn, mem prizorgas la unuajn laboristinojn. Kiam ili plenkreskiĝas, la reĝino jam nun metas ovetojn, restas en nesto kaj ĉion alian prizorgas novaj laboristinoj. Ilia ĉefa tasko estas defendi la neston kaj nutri la larvojn. Ili estas karnomanĝuloj, tial vespoj ĉasas tiom multe da insektoj. Tiuj larvoj ankaŭ produktas en siaj glandoj sekreciojn riĉajn je proteinoj, precipe sakaridoj. Kaj ĝuste por ke ili povu nutri siajn laboristinojn.

Foje meze de somero, ĉiuj larvoj laboristinoj jam elkoviĝis kaj en nesto restadas nur kelkaj dekoj da novaj elkoviĝintaj larvoj kiuj fariĝos reĝinoj kaj estontaj virseksuloj. En tiu etapo la laboristinoj aperas en situacio, ke ili ne havas de larvoj sufiĉe da „sukera“ nutraĵo. Ili fariĝas nervozaj kaj koleremaj kaj devas ĉiakoste manĝi sukeron, tial ili terure ĝenas homojn, kio kutime okazas fine de aŭgusto. Tial ni vidas tiam vespojn pli ofte ol

printempe kaj dum la unua duono de somero, flugante super la ĝardeno, serĉante malutilajn insektojn.



Kaj kiam ili ŝtelas ion de ni, tio estas ekzemple viando el telero aŭ forigita tranĉaĵo de ŝinko. Poste iliaj manieroj ŝanĝiĝas kaj ili ekflugas sur ĉion, kio estas dolĉa. Ili klopodas ĉiakoste akiri energion el sukero kaj kutime pikas nin, kiam ni provas ilin forpeli. Pro tio plej bone funkcias resti trankvila, maksimume atenteme ni provas forpeli ilin, sed ĉefe ne fari fortajn movojn, postkuri ktp., tio la vespojn ankoraŭ pli ekscitas.

El la magazino Květy (Floroj). tradukis E. Pazourková

## Dum la tuta jaro brazilanoj partoprenas en diversaj festoj

La brazila popolo estas ĝojema kaj festema. Dum la tuta jaro ni plezure partoprenas en popularaj, tipaj kaj religiaj festoj.

La brazila Karnavalo estas la plej konata en la mondo, precipe la Karnavalo de Rio-de-Ĵanejro. Tamen, en Brazilo estas multe pli ol sambo kaj karnavalo! Multaj festoj okazas dum la tuta jaro en ĉiuj ŝtatoj de la lando.

En Oktobro okazas, en la suda regiono de Brazilo, diversaj tradiciaj festoj, de la komenco ĝis la fino de la monato, en pluraj urboj de la subŝtato Sankta Katarino.



Ĉiuj ili similas al la germanaj festoj: tradiciaj dancoj kaj tipaj manĝaĵoj, ludoj kaj ankaŭ multaj bieroj. Turistoj alvenas el pluraj brazilaj urboj, kaj ankaŭ argentinanoj ĉeestas. Tiuj eventoj daŭras unu semajnon.

La ĉefa el ili estas en la urbo Blumenaŭ. Ĝi estas konata kiel O*ktoberfest* kaj estas la dua plej grava populara festo de la lando.

En Blumenaŭ, unuatage, multaj glasegoj da biero estas distribuataj senpage al la popolo. Blumenaŭ estas bela urbo, trankvila, gastama kaj turisma, konata kiel "Ĝarden'-Urbo" kaj estis fondita de germanaj enmigrintoj en 1850.

Verkis: Liette Lêla
(Reviziis: Célio Freitas Martins)